

LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTO-
RÖRELSEN I SVERIGE



UTGIVEN AV GEFLE
ESPERANTOFÖRENING

Officiellt organ för Svenska Esperanto-Förbundet (S. E. F.)

N:o 12.
December 1914.

Redaktör:
R. PEHRSSON
Kraftverket, Älvkarleö.

Ansvarig utgivare:
W. WAHLUND
Gävle.

Lösnummer 10 öre.
Årsprenumeration 1:20 kr.
Annonspris 5 öre pr mm.

Esprimante al ĉiuj niaj kunlaborantoj kaj legantoj nian sinceran dankon por ilia subteno al La Espero dum la pasinta jaro kaj esperante, ke ili same dum la venonta helpos nin puŝi nian aferon paŝon antaŭen en nia lando, ni deziras al ĉiuj feliĉan prosperan novjaron.

La redakcio.

Esperanto på slagfältet.

»La Ondo de Esperanto» innehåller i sitt senaste nummer följande brev från en rysk esperantist, som deltagit i striderna mot österrike:

—»Och nu — skriver han — till esperanto! Du förväntar dig väl, kära vän, och säger: »Kan man även under sådana upplevelser tänka på esperanto? — Ja, efter sådana kritiska ögonblick tänkte jag icke och kunde icke tänka på esperanto, men de händelser i fråga om esperanto, som jag upplevde, ha gjort ett så starkt intryck på mig, att jag icke kan låta bli att skriva till dig om dessa tilldragelser, som jag alls inte väntat.

Det var en kväll; vädret var otäckt och regnigt — det var redan andra

dagen som vi lågo i fästningsverken och väntade på fienden — på fältet rådde dödystnad, så att man kunde höra flugornas surrande. Då och då höres ett lågmält ord, som någon yttrar till en annan — kölden ilar genom mina ådror — åter råder dödystnad... Plötsligt hör jag, hur någon frågar en kamrat på esperanto: »Kioma horo estas? (Hur mycket är klockan?)» — Jag trodde icke mina öron; drömmer jag icke, frågade jag mig själv; hörde jag verkligen en esperantistisk fras? Jag spanner öronen, vänder på huvudet och ser: en soldat tittar ivrigt på klockan, som är fäst vid handen, och försöker urskilja i mörkret, hur mycket den är. Slutligen hör jag svaret: »Klockan är tio; det är tidigt ännu...» Ja, tänker jag, det här är rena esperanto, jag måste ge mig till känna. — »Sinjoroj, sinjoroj! — ropar jag, men man svarar icke. Jag märker, att mina ord ha förvirrat de esperanto-talande, och jag ropar på nytt:

—»Sinjoroj samideanoj! (Herrar meningsfränder!)»

—»Till eder tjänst, ärade meningsfrände,» får jag till svar.

—»Var så god och stig in i min salong!» hörs en annan röst från andra skyttegravan... Och saken var snart klar. Den ene var en armenisk esperantist från Kaukasien och den andre en rysk meningsfrände från guvernementet Radom. Allt ifrån första början ha de tjänat tillsammans och hittills icke skilts åt. På vägen till krigsskådeplatsen ha de i flera städer mött esperantister, som tillmötesgående tagit emot dem. Armeniern var en pratsam och intelligent ungar, han överöser mig med sitt glada skämtande och talar om för mig, att det i vår rote finnes

fem esperantister: tre polacker, en ryss och en armenier — och jag är den sjätte... Jag måste erkänna, käre vän, att vid dessa underrättelser blev jag glad, — jag glömde kylan — hungern — och måste med eler mot min vilja skratta åt armeniernas historier. Vi talade om kriget, om Belgien och dess hjältar, som strida för sanningen, om världskrisen och allt möjligt, som om faran icke hängde över oss — tyvärr räckte denna tid icke länge. Det kom order, att vi skulle väpna oss — vi voro genast färdiga och väntade på sista befallningen. Vi togo adjö av varandra.

Nu hörs det första skottet, vars stämman kastas tillbaka som ett eko vid den avlägsna horisonten — det hörs ett andra, ett tredje — kanondundret brakar löst, och som hagel eller en svärm av rasande getingar flyga kulorna över våra huvuden med ett öronbedövande vinande. Det var farligt att lyfta huvudet — jag ämnade ladda om geväret, men en kula träffade mig i axeln och jag förlorade medvetandet. Vad som skedde under denna tid, vet jag icke, men när jag åter kom till sans, fick jag veta, att jag befann mig hos fiendens sjukvårdare, — jag och några till av våra soldater. Man förde oss till någon liten stad. Det var redan dag, när vi körde in på en gård, där det fanns en mängd österrikare. Något slags befäl kom ut ur huset och frågade oss om våra namn. Sedan gav man oss mat. Soldaterna, bland vilka voro ungare, österrikare och ukrainare, ställde sig runt omkring oss och tittade på oss »med stort intresse». Det blev ett allmänt skratt och skämt — den ene ville överflygla den andre i fråga om spelfulla an-

märkningar och skrattet är änd-
löst...

Min uppmärksamhet fästes sär-
skilt vid en ungersk soldat, som
örörligt stod och betraktade mig.
Gång efter annan syntes han falla i
tankar, rynkade pannan och liksom
sökte erinra sig något. Hans blick
irriterade mig, och jag visste icke
vad han ville mig. Se, han gjorde
en rörelse, som om han tänkte gå
fram till mig, men han kom icke.
Då trädde befälhavaren ut, man för-
de mig till sjukhuset, som var i sam-
ma gård; de andra fångarna förde
man bort någonstades. Dagen där-
på kom en soldat in till mig, samma
soldat, som icke hade upphört att
betrakta mig i går. Jag blir litet
förvirrad, men han ler och säger:
»Esperantisto?... Är ni icke herr
Temer?» — Detta gjorde mig ännu
mer förvirrad. Och jag svarade:
»Ja, men hur vet ni det?» — »Helt en-
kelt» — svarar han — »jag är espe-
rantist, Adolf Arkövy från Budapest,
bror till Paulina Arkövy, som ni
brevväxlar med — jag har sett hos
henne edert fotografi och med stort
besvär har jag lyckats erinra mig
er!»

Nå, käre vän, föreställ dig min
glädje! Vi tillbringade tiden på ett
utomordentligt sätt, trots jag var
»fånge». Men efter några dagar blev
det oväsen. Man började forsla
bort allt från gården och från trak-
ten omkring. Jag fick veta, att även
vårt sjukhus skall flyttas och verk-
ligen, man börjar göra allt i ord-
ning att ge sig i väg — men det var
redan för sent, ty lyckligtvis kom
den ryska hären. Mig och de övriga
sårade sände man tillbaka till Ryss-
land. Då jag skriver det här brevet,
kan jag icke ens nu tro, att jag verk-
ligen upplevat allt detta, och allt
låter som en saga för mina öron!»

Kan man längre tvivla på världs-
språkets, det internationella hjälp-
språkets existens? Eller kan man
ej i episoder, som den ovan berätta-
de, skönja början till världsspraks-
tankens förverkligande i praktiken?



S. E. F.

Inbetalda årsavgifter:
Jönsson, Gustaf, Karskär 7, Bom-
hus.

Kvitteras d. 4/11 14.
J. Helsing.
Kassör.

Ur Esperantos syntax*).

Då det gäller två helt olika språk,
som t. ex. svenska och Esperanto,
så får man ej fordra ovillkorlig
överensstämmelse dem emellan i
alla enskildheter.

I vilket som helst språk kan man
uttrycka sig oklart, vare sig med-
vetet eller omedvetet. I senare fal-
let kan oklarheten vara beroende
antingen på bristande herravälde
över språket, eller också på att
språket innehåller sådana uttryck,
som i sig själva äro tvetydiga, och
som endast genom textsammanhan-
get eller andra omständigheter bliva
klara. Ett sådant uttryckssätt finna
vi, om vi t. ex. betrakta ordet »hu-
set är köpt av en främling». Vi
kunna då ej med säkerhet uppfatta
om främlingen varit köpare eller
säljare. »Boken är lånad av Anders-
son» betyder antingen att Anders-
son har lånat boken, eller att den är
lånad hos honom. Rätta meningen
förstår man endast, om man när-
mare känner till vissa omständig-
heter angående det som omtalas.

Här må upprepas det nyss sagda,
att man ej får fordra full överens-
stämmelse mellan två så olika
språk, som svenska och Esperanto.

Om man på Esperanto säger »la
letero estas skribita de S:ro Martin»,
så betyder detta att hr Martin har
skrivit brevet; »Petro estas punita
de sia patro», Per är straffad av sin
far; »Paŭlo estas laŭdata de sia pa-
trino», Pål berömmes av sin mor,
o. s. v.

Även i Esperanto måste vissa ord
— särskilt de s. k. prepositionerna —
hava olika betydelse vid olika till-
fällen, men på grund av språkets
roll som mellanfolkligt hjälpspråk
måste dock varje ord hava en och
samma betydelse vid alla de tillfäl-
len, då ordet intager enahanda
ställning i satser av samma slag.
Alltså: »la domo estas aĉetita de
fremdulo», huset är köpt av en främ-
ling — en främling har köpt huset
(den händelse, som angives genom
ordet aĉetita, har utövats av den
person som angives genom preposi-
tionen de). La domo estis vendita
de urbano», huset har sålts av en
stadsbo.

Vad återigen skulle beträffa sat-
sen »la libro estas pruntita de An-

dersson», så vore det lika oklart som
i den motsvarande svenska satsen.
Orsaken härtill ligger i en tillfällig
överensstämmelse mellan de båda
så olika språken — svenskan och
Esperanto. Händelseordet »prunti»
betyder nämligen icke endast »ut-
låna», såsom det angives i en ofta
otillförlitlig esp.-svensk ordbok, men
överensstämmer i sin tvetydighet
fullkomligt med det svenska ordet
»låna». Av flera orsaker skulle det
ej heller vara önskvärdt, att ordet
hade en mera bestämd betydelse.
För medlemmar av många och lar-
rika nationer — således icke endast
för svenskar — skulle det vara gan-
ska svårt att fästa i minnet en sär-
skild betydelse »låna bort» eller »få
till låns». För att ett lån skall kun-
na ske fordras både att lånet gives
och att det tages — både långivare
och låntagare — och dessa tvänne
motsatta begrepp äro sammanfatta-
de såväl i svenska ordet lån, som i
esperantoord-roten prunt'. Om
man emellertid avser endast endera
av de betydelse, som ordet har, och
textsammanhanget eller något annat
förhållande ej anger om boken är
utlånad av Andersson, eller om han
innehar den som lån, så bör man
alltså — såväl på Esperanto som på
svenska — välja ett klarare uttryck.
På Esperanto kan man t. ex. säga
antingen »la libro estas pruntedoni-
ta de Andersson», eller »la libro
estas prunteprenita (pruntericevita)
de li», och ingen ovisshet bör då fö-
refinnas om betydelsen av det som
sägs.

Här må få tilläggas några ord vid
sidan om ämnet.

Vi veta huru Esperanto uppkom.
Redan på 1870-talet hade dr Zamen-
hof visserligen gjort ett förberedan-
de arbete, men först då han i sin
ensamhet avfattade originaltexter
och översättningar på det språk,
som han förut ansett så gott som
färdigt, antog språket så småning-
om det skick, vari det offentlig-
gjordes 1887. Den lilla ordlista, som
då utkom, innehöll inga andra ord,
än sådana som approvats och be-
funnits ändamålsenliga, och samma
regel har alltjämt gällt för nya ords
införlivande i Esperantos ordförråd.
Även om en och annan ordboks-
författare gjort försök i motsatt
riktning, så ha dock i verkligheten
inga andra ord inkommit i Esperan-
tos allmänna ordförråd, än sådana

*) Syntax kallas den del av språkläran,
som avser bildningen av satser och de skilda
ordens förhållande till varandra i en sats.

Reabonu je La Espero!

som varit behövlige — och ordens betydelse har fastställts så, som den angivits av den praktiska användningen. Ett språks ordförråd är icke alldeles detsamma som dess ordböcker, men en samvetsgrannt utarbetad ordbok bör, så gott som det är möjligt, upptaga språkets ordförråd sådant det verkligen är — icke sådant författaren själv tilläventyrs anser att det bör vara.

För övrigt har ingen kommitté eller akademi fått i uppdrag att utfundera tillägg eller ändringar i Esperantos ordböcker, men i mån av behov ske dock alltjämt förändringar i språkets ordförråd. Såsom ett exempel härför kan anföras ordet aspekto, som i bruket helt och hållet undanträngt germanismen elrigardo — utseende.

Om motsatsen varit fallet — d. v. s. om språket icke fått uppstå så att säga av sig självt, utan i stället tillverkats av en eller flera ordboksförfattare före användningen — så torde sannolikt många enskildheter kommit att visa sig ganska svårhanterliga i det praktiska bruket. Det är föga troligt, att ett och samma ord då, till fromma för dess användbarhet, kommit att innefatta två så motsatta begrepp, som utlåna och få till läns.

Jln.



Sveda Kroniko.

Norrköping.

Karaj gesamideanoj!

Post fervora laboro en Norrköping ni atingis tion, ke la intereso de la urbanoj estas vekita kaj nia klubo estas pligrandigita. Ĝis nun pli ol 30 personoj fariĝis membroj. En granda publika kurso, kiun ni aranĝis kaj daŭrigas, partoprenas pli ol 50 personoj. Post la novjaro ni esperas duobligi tiujn ĉi ciferojn.

Por propagando kaj fortigo de nia ekonomia stato, ni nun eldonos kristnaskan kaj novjaran publikigaĵon. Rigardu nian anoncon!

Norrköping la 13:an de decembro 1914.

Por »La Esperanta Stelo»
Leander Tell, prez.

Reabonu je La Espero!

L. A. Hubendick †.

Mortis en novembro lasta unu el la plej interesitaj esperantistoj en Stockholm, eks-kapitano de la Reĝa militŝiparo Ludvig Andreas Hubendick.

Kapitano Hubendick, partopreninte la tre sukcesan kurson de esperanto dum la aŭtuno de 1905 en Stockholm, fariĝis de tiam fervora membro de la ĉefurba grupo, kies kunvenojn li fidele vizitadis. Jam maljuna homo — naskita en 1835 —, li iom suferis de surdeco, kiu en la lasta jaro de lia vivo tiom grandigis, ke li preskaŭ nenion aŭdis el la diskutadoj.

H. estis homo kun multaj kaj varmaj humanaj intereso, grandaj spertoj de la vivo kaj vastaj vojoj kiel maristoj ordinare.

La esperantista grupo en Stockholm kaj kun ĝi certe la aliaj esperantistoj sincere funebras tiun sian fidelan grupanon.

Li ripozu en paco!

P. Nn.



La milito kaj esperanto.

En la nunaj militaj tagoj multe da personoj konstatis la grandan valoron de esperanto; de la esperantistaj organizacioj. La verda stelo, la simbolo de la espero, ne perdis sian brilon, kvankam preskaŭ tuta Eŭropo staras en brulo. La verda stelo ne estas vana dekoracio; tion spertis multaj homoj, suferantaj pro la mondmilito. Ne ankoraŭ venis la tempo por paroli pri la helpo de esperanto. En la nuna momento multaj, ho ve!, tro multaj suferas kaj bezonas nian helpon. Franca profesoro skribis al mi leteron, kiu interalie enhavis atentindan proponon. Li skribas: »La milito, kiu dividas nian landon kaj Germanujon, alportas kun si senombraj malfeliĉaĵoj. Ĉu vi ne opinias kiel mi, ke esperanto devas klopodi por dolĉigi ilin kiel eble plej multe? Jen do pri kio mi pripensis. Se vi bonvolus skribi al iu germana esperantisto aŭ esperantistino, kies ĉeesto en sia urbo estus al vi certa, eble li bonvolus viziti la francajn, anglajn k. a. mal-

liberulojn, kaj, sen malrespekti la regulojn, provi havigi al ili kelkajn dolĉaĵojn. Sufiĉos por tio, ke via korespondanto trovu, inter la malliberuloj aŭ iliaj gardistoj, iun parolantan la germanan aŭ pli bone la esperantan lingvon, aŭ ankoraŭ, ke la korespondanto mem konu la francan aŭ anglan lingvon. Komprenoble la malliberuloj tre volonte lernadus tuj esperanton por povi flue paroli kun la vizitanto aŭ vizitantino. Por mi, tre volonte ankaŭ mi petus de la Franca Societo por la Propagando de Esperanto, kies komitatano mi estas, ke ĝi sendu al la malliberuloj la necesajn lernolibrojn. Kaj tiel, vi kaj mi, ni estus unu fojon pli amigitaj nian karan lingvon. — Via sindona *L. Demarcy*, prezidanto-fondinto de la Grupo esperantista en *Beauvais*, (Oise), Francujo, 18 rue Sadi Carnot.»

La bonkoraj vortoj de la franca profesoro meritas ĉian atenton kaj mi estas certa, ke la legantoj de »*La Espero*», kiuj povas ion fari, helpos, laŭ la direkto, montrita de mia franca samideano.

Theodor Rosengren.



»Ili, kiuj opinias ke la milito estas eterna kaj la tasko de l' eston-teco nur krei novajn, pli terurajn infermaŝinojn, ilin oni devas demandi: Ĉu vi do ne vidis, ke nova stato de l' animo estas faranta al si vojon tra la terurajoj. Ĉu vi ne vidas la arkon de la promeso super la deluĝo, profecianta pri la tempo kiam tio estos vero, kion la malproksimen vidantaj neas kredi; ke la popoloj staros unu apud l' alia en same harmonia kolorludo kiel la koloraro de la ĉielarko kaj ke tiel nenecesa kiel estas kontrasto inter la amo de la individuo al la hejmo kaj al la regiono, aŭ inter la amo al la regiono kaj la amo al la lando, tiel nenecesa estas la ekzisto de kontrasto inter la amo al la lando kaj la amo al la homaro. Ĉar ekzistas nenia necesa kontrasto inter patriotismo kaj nacionalismo. Sed kontraŭe grandega streĉeco inter la malnova formo de patriotismo kaj la nova.»

Ellen Key.



En Baĥarah.

Imitajo laŭ A. T. Gellerstedt.

Desegnante multhore ni sidis
en sunbril' en monta ruin'.
Jam ne ŝercis ni, aŭ ridis,
sed sopiris al manĝ' kaj vin'.

En la urb' en la valo ni trovis,
kiel neston de birdogent',
gastejon en florgardeno
kun malnova stil' kaj silent'.

Nia tablo staris en ombro
en ŝirm' je suna varmaj';
da glasoj jen plena nombro,
kaj bonodoranta rostaj'.

Malnovtempon ni vidis revante,
ĉar ne estis moderna la ŝajn' —
malaltpreze ja ĉio, kaj grandkvante,
sed ne konsideroj pri gajn'.

Ekbruligis la pipojn ni feliĉaj,
kaj levigis la fum al plafon'
konsistanta el branĉoj foliriĉaj
en volbeforma malpeza kron'.

Sentante viklecon kaj ĝojon
pli ol estis kutime al ni,
nur malfrue ni iris la vojon
por ĉiam for el dom' tiu ĉi.

La gemastra filin' ĉe la pordo,
kun bela ruĝec' sur vizaĝ',
donis rozojn en ĉarma ordo,
kaj bondezirojn por nia vojaĝ'.

X.



Sentencoj el Havamal.

Ŝtupo post ŝtupo
bruliĝas ĝis ĉiu elbrulos,
flamoj naskiĝas el flamoj;
viron kun viro
alligas celado,
sed senagemulo ne havas kolegojn.

Frue vekigu tiu,
kiu havas intencon
ŝteli de alia trezoron aŭ bruton;
kuŝanta lupu
kaptajon ne povas akiri;
nek venkas viro dormanta.

Matene vekigu tiu,
kiu sklavojn ne havas;
li mem al sia agado rapidu.
Multe malzorgas
la en matenoj dormanta.
Entrepreneuron donas duonan riĉecon.

P. Ahlberg 50 år.



För den yngre Esperanto-genera-
tionen, torde namnet P. Ahlberg va-
ra alldeles okänt. Dock har hr P.
Ahlberg på ett tidigare skede spe-
lat en icke oväsentlig roll inom den
stora Esperanto-världsrörelsen. Så-
som ledare för den svenska esperan-
tistiska rörelsen intog han därmed
även på sin tid en framstående
plats inom världsspråkrörelsen,
och han blev genom omständigheter-
nas makt en tongivande centralfig-
ur för Esperanto i Norden, sär-
skilt då i Sverige. Ingenting kunde
dock ha varit olyckligare. Herr P.
Ahlberg torde nog själv vara den
förste att erkänna, att han, som
chef, saknar nödiga förutsättning-
ar. Han, den optimistiske svärmar-
ren och opraktiske drömmaren, som
ledare för Esperantorörelsen! En
rörelse, som visserligen är ideell till
sin natur, men med så vittgående
praktiska konsekvenser. Men låtom
oss i dag lämna detta hr Ahlbergs
»ledareskap» och i stället dröja vid
hans otroliga arbetsförmåga, hans
aldrig sinande arbetskraft till Espe-
rantos fromma i vårt land. En ar-
betsmänniska, som få, har hr Ahl-
berg i det tysta nedlagt ett träget
arbete för Esperantovärldsrörelsen,
utfört stordåd, som aldrig av oss
skola glömmas, och hans insats, så-
som utgivare av ord- och läroböcker
etc., i Esperanto, är av ett bestående
värde. I en rörelse, som vår, be-
hövas personer, som troget kunna
utföra de löpande göromålen, sköta
det grövre, ofta så tunga arbetsma-
skineriet. Herr Ahlberg har i detta
avseende varit oersättlig, han har

varit den outtröttlige arbetsmyran,
den alltid till hands varande »la-
bora azeno». Och han trivedes slut-
ligen därmed i denna underordnade
ställning, och det länder honom till
heder, att han själv så snart insåg
sina ledarbrister, sin begåvnings be-
gränsning. Det låg rent av i sakens
natur, att hr Ahlberg skulle bli ett
lätt offer för den »reform»-riktning,
den idorörelse, som med stora åt-
hävor och lockande fraser för några
år sedan framträdde inom Esperan-
tovärlden. Vi veta alltför väl, att
hr Ahlberg förlorat sitt ungdoms-
ideal, att han, utan att blinka, nu
förrirat sig in i en labyrint av
världsspråksbråk, insvept i den ido-
itiska »vetenskapens» töcken. Ehuru
vi sålunda nu måste räkna hr P.
Ahlberg bland avfällingarnas dyst-
ra skaror, skall det ingalunda
hindra oss på denna hans högtids-
dag att uttrycka ett varmt och upp-
riktigt tack för vad han i sin ung-
doms och mannasträffs bästa dagar
velat och verkat för — *Esperanto*.
Tack vare hr Ahlbergs nitiska ar-
bete även på sista tiden, har Espe-
ranto gått framåt högst betydligt.
Ett honnör till *arbetsmänniskan* och
polismannen P. Ahlberg på femtio-
årsdagen!

T. R.—n.



Ellen Key 65 år.

65 år fyllde den 11 dennes Ellen
Key, vår frejdade författarinna, och
från alla håll kommo varma hyll-
ningar henne till del. Dagen firas
i stillhet, i sorgsen stillhet skul-
le man kunna säga, ty för den som
i likhet med Ellen Key i djupaste
och varmaste mening känner inter-
nationellt och vars personliga vän-
krets omfattar snart sagt alla kul-
turländ, över dens sinne lägga de
pågående tidshändelserna en oav-
lyftlig tyngd. Men Ellen Key har
icke hört till dem som i besinnings-
lös skräck släppt tron på sina ge-
nom livet dyrkade ideal. Ännu för-
mär hon bjuda de många som älska
och beundra henne en kostlig och
styrkande dryck av tros- och seger-
visshet — det hon visade vid det
besök hon för någon tid sedan av-

Reabonu je La Espero!

lade i Stockholm. Strands vithåriga värdinna är alltjämt lika ung till sinnes som den häcklade radikala ungdomsföröföerskan en gång var, lika hjärtgod och lika varm. Och om det hatfulla skallet kring hennes person så småningom tystnat har icke hyllningsbruset gjort det. Det omsusar hennes ålderdom liksom bokskogen på Ombergs-sluttningen över hennes hem och Vätternvågornas aldrig vilande slag mot stranden.

Så långt artikelförfattaren i Dagens Nyheter. Må jag blott tillägga, att Ellen Key för oss esperantister alltid har varit en trefast vän. Hennes varma intresse för *Esperanto*, hennes ljusa tro på den esperantiska världsrörelsens brödraskap har aldrig slocknat. Då jag själv för några år sedan ämnade utgiva ett större arbete om Esperanto, dess betydelse för vår tids kultursträvanden, erbjöd sig Ellen Key, vid det samtal jag då hade med henne, att giva ett bidrag i likhet med andra representanter på vetenskap, konst och litteratur. Bägge reste vi dock utomlands, och utgivandet av den ifrågavarande boken blev tyvärr uppskjutet, ehuru det rikhaltiga materialet var samlat och systematiserat. Dock — gömt är icke glömt — och vi esperantister bringa henne våra varmaste välönskningar på högtidsdagen.

Teodor Rosengren.



Malsanoj kaj kuracado

laŭ la malnova kredo de la sveda popolo.

Miljara aŭ ankoraŭ pli malnova kulturo nun iom post iom malaperas en Svedujo. Jen unu el la trajtoj de tiu prakulturo: la superstiĉo rilate al malsanoj kaj kuracado.

La sorĉisto, »la saĝa maljunulo« — aŭ maljunulino — estis ĝis la mezo de la 19-a jarcento la sola kuracisto de la popolo; kun dubo kaj malfido oni evitis la medicinajn klerulojn kaj iliajn konsilojn. La nuna generacio ĝenerale nek kredas nek uzas la sorĉojn, sed ankoraŭ ne mortis la lastaj sorĉistoj, kaj eĉ ne mankas al ili klientaro, ĉar oni ankoraŭ ofte petas konsilon de »saĝulo« se la medicina arto ne kontentigas.

Por eviti ridetojn kaj riproĉojn de dubuloj, la malsanuloj kaj iliaj familioj ordinare sekretigas tiajn vizitojn, kaj multaj homoj el la edukitaj klasoj tial apenaŭ scias, ke en ilia lando ankoraŭ ekzistas duone sekreta restaĵo el la misteraj moroj de la prapatroj. Cetere la gesorĉistoj ankaŭ kuracas brutajn malsanojn, revenigas ŝtelitajn objektojn, malsanigas malamikojn, k. t. p.

Laŭ la popola kredo la malsanoj ofte estas venĝo de mistikaj estuloj, kiuj loĝas parte en ŝtonaretoj aŭ en amasoj el balaĵoj, sed ĝenerale en fontoj kaj riveretoj. Blasfemi apud akvo estas do tre danĝere post la subiro de la suno, ĉar tio certe kaŭzos malsanon. Oni diras, ke almenaŭ kelkaj el tiuj malsaniguloj similas lacertojn, sed ne estas facile scii ĉu tiu diro estas ĝusta, ĉar ili ordinare estas nevideblaj. Eble oni kelkfoje eraris, vidante realajn lacertojn. Malsano ankaŭ povas esti »metita« de malamiko, aŭ kaŭzita de renkonto kun malica spirito.

Malsamaj malsanoj postulas malsamajn kuracmanierojn. La unua ago de la kuracisto do celas esplori la devenon de la malsano, tio estas la cirkonstancoj kiam unu aŭ alia ekzistulo estis ĝenata, k. t. p. Por tio li ordinare tenas super la malsanulo vazon plenan je akvo, kaj verŝas en la akvon iom da fandita plumbo. La formo de la plumbpeco evidente montras al li la kaŭzon de la malsano, kaj laŭ tio li difinas la kuracrimedon. La kuraciloj estas multaj kaj tre diversaj. Sorĉvortoj estas ofte uzataj; oni tiam diras, ke la saĝulo »forlegas« la malsanon. Fumo de kelkaj muskspecoj aŭ de sulfuro, ŝtalo firmigita super la lito (kudrilo sufiĉas), sidi tute nuda en la fajrujo de forĝejo kaj tie esti surblovata per la blovilo, kaj »kontraŭsune« turni ian objekton super la malsana korpparto, estas aliaj rimedoj kontraŭ malsanoj. Se oni iamaniere kombinas la mistikan nombron naŭ kun la kuracago, des pli bone.

Simplajn malsanojn oni scias kuraci sen helpo de profesia sorĉisto. Por kuraci dentdoloron oni povas piki per lignopeceto la dentojn ĝis kiam sango aperos. Post tio oni firmigas la lignopeceton en la ŝelon de iu arbo, kaj tiamaniere oni translokigas la dentsuferon en la arbon. Precipe oni metas dentsuferon en sorpujon, kaj tiu persono, kiu de tia arbo tranĉas aŭ rompas eĉ plej malgrandan branĉeton, riskas ekhavi la malsanon.

Alia maniero estas enterigi la lignopeceton apud »terfirma« ŝtono; dum la ligno ne estos elputrinta oni ne sentos la doloron.

Jln.



Novjaraj bondeziroj.

- Al la verda stelo — eterna fidelo
Al nia gazetaro — pli multa legantaro
Al la idistoj — *poke raciono* kaj pri ŝanĝoj *nul propono*
Al niaj junuloj — belaj knabinoj, multe da amo, multe da flamo.
Al junulinoj — samo
Al maljunuloj, sendentuloj — bonbonoj tre malkaraj.
Al edziĝontaj fraŭloj — bopatroj malavaraj.
Al la fraŭlinoj — iĝi edzinoj kaj patrinoj
Al la neparo — mortanta avaro
Al la infanoj — ludiloj, puniloj, oreltirado, postajbatado: sume kreskado;
Al la esperantistaro — ne persekuto de vento, sed regno, parlamento, soldatoj, policanoj, maljunaj senatanoj!

»Danubo«



Kristnaska ĝojo en la parcela dometo.

Ili estis maljunaj, Sven kaj Brita. En kvardek jaroj ili loĝis en la dometo »Lövbacken«. Multe da ŝvito kaj laboro kostis al Sven atingi tiun situacion, en kiu li nun estis. Kiam Sven kaj lia edzino antaŭ 40 jaroj transloĝis al la bieneto, estis nur malmulte da kampo ĉirkaŭ la domo. La arbaro kreskis preskaŭ ĝis al la pordo. Sed Sven havis la ĝustan kuraĝon. Li kulturis, faris vojojn kaj plantis fruktarbojn k. t. p. Kelkfoje li laboris preskaŭ la tutajn noktojn post la hejmvieno el la laboro en la bieno. Nun ili estis maljunaj, Sven kaj lia edzino.

Reabonu je La Espero!

Iliaj infanoj eliris en la mondo, por mem gajni sian panon. Al la granda lando en la okcidento ili direktis sian iron. En la komenco ili skribis hejmen, sed baldaŭ ili finis skribi, ĉiuj, krom la plej juna, — Ebenhard estis lia nomo. Li ne forgesis la gemaljunulojn.

Je ĉiu kristnasko li skribis hejmen kaj sendis monon.

Nun estis antaŭkristnaska vespero. Sed la ĝusta kristnaska ĝojo ŝajnis esti mankanta al la gemaljunuloj en Lövbacken. Du aferoj kaŭzis tion. Tiu ĉi jaro ili ne ricevis leteron de Ebenhard, li kiu ĉiam antaŭe skribis. Tio estis unu kaŭzo. La alia estis, ke la bienposedanto diris ke la gemaljunuloj, kiuj ne povis fari tutan taglaboron, devus transloĝi el la malriĉa parcela domo.

En la domo la gemaljunuloj sidis en la krepusko, interparolante. Frapeton ili aŭdis sur la pordo. Du personoj, sinjoro kaj virino envenas, vestitaj en dikaj peltajoj »Bonan vesperon kaj bonan kristnaskon, mia patro kaj patrino!» la sinjoro diris. Dum momento regis silento en la domo. »Ĉu estas vi, Ebenhard? Tiam vi tamen ne forgesis nin,» diris Sven fine. »Jes, certe,» diris Ebenhard, »nun mi venis hejmen.» Kaj tie ĉi estas mia ŝanĉino, li diris, dum li kondukis ŝin antaŭen, ĉar ŝi haltis ĉe la pordo. Rec regas silento en la domo. La gemaljunuloj rigardas unu la alian. La ĝojo brilas en iliaj okuloj. Fine diras patrino Brita: »Dio vin benu, mia infano, kiu hejmenis al viaj gepatroj. Dio benu vin ambaŭ!»

Nun estis kristnaska ĝojo en la parcela domo, kaj ĝi ne estis pli malgranda, kiam Ebenhard diris, ke li intencas liberaĉeti la parcelon antaŭ sia reiro al Ameriko

El la sveda de
Einar Adamson.



Devoj de la esperantistoj rilate al la gejunuloj

Esperanto, la lingvo de la espero! Jam la nomo esprimas la fakton, ke nia celo estas atingata nur en la estonteco. Pripensu tion, esperantistoj! La venonta generacio, nuntempe ankoraŭ infanoj aŭ gejunuloj, decidus, ĉu nia lingvo venkos kaj

daŭros. Zorgu, ke nia junularo jam frue konvinkigu pri la valoro de nia ideo, ke la scipovo de nia lingvo estu al ĝi valora trezoro, bezonata por la praktika vivo. Nur plenuminte ĉi tiun devon vi estos certaj, ke ili ne iam parolas pri vi kiel pri utopistoj sed kiel pri pioniroj de venka ideo. Sekve vi laboras por via propra afero, se vi propagandas Esperanton inter la junularo.

»Kiu havas la junularon, tiu havas la estontecon». Tion oni en nia patrujo en la lastaj jaroj ĉie ekkonis, kaj vera batalo komencis pro la junularo. En ĉiuj partoj de nia patrolando fondiĝis unuigoj, kiuj celas konvinki kaj entuziasmigi la gejunulojn por siaj ideoj, ĉu politikaj, ĉu naciaj, ĉu religiaj. Pli ol la aliaj ni esperantistoj devas partopreni la batalon pro la junularo, ĉar ĝi reprezentas nian esperon, nian venkon aŭ pereon.

Ĉiu esperantisto havas devojn rilate al la gejunuloj. Kion vi, kara samideano, ĝis nun faris por ili? Eble vi respondos: »Mi ne havas okazon.» Serĉu ĝin! La estroj de la gejunulaj unuigoj estas dankaj al ĉiu, kiu kunhelpas al iliaj celoj farante pliklerigajn aŭ instruajn paroladojn aŭ migrante kun la gejunuloj. En multaj urboj la gejunulaj unuigoj havas siajn apartajn »hejmojn», kie la junaj vizitantoj pasigas siajn vesperojn legante, aŭskultante paroladojn aŭ rakontojn, ludante k. t. p. En tiaj lokoj ankaŭ Esperanto devas havi sian hejmon.

Kiu laboris en la junulaj unuigoj, kiu vizitis la kunvenojn en la nomitaj »hejmoj», tiu spertis, ke tie tre ofte estas okazo, fari propagandan paroladon por nia Esperanto. Ne estas malfacile, entuziasmigi la junajn aŭskultantojn. Propagandiloj kaj klarigantaj presajoj estas legataj tie kun granda intereso. La permeson, aranĝi kurson en la »hejmo» estas tre volonte donata, ĉar oni dankas al ĉiu, kiu bone plénigas la liberan tempon de la junuloj. En la kurso povas fariĝi grupo de junaj geesperantistoj eble en la sama »hejmo» — vere bonegaj ŝancoj.

Sed ne ĉie ekzistas tiaj »hejmoj». Kion fari alie? La respekto kaj la ŝatateco de nia lingvo kreskas pli kaj pli. Jam oni kolektas kaj publikigas la opiniojn de eminentaj kleruloj pri Esperanto, por konvinki la kontraŭulojn kaj indiferentulojn. La libre enbavanta ĉi tiujn elparolojn estas grava propagandilo por ni. Sendu ĝin al la estraro de viaj

lernejoj kune kun petskribo pri uzado de lerneja ĉambro. Certe la provo ne ĉie sukcesos, sed kelkaj gajnitaj lernejoj estas jam granda utilo. Plej grave estas, ke vi elektu el viaj grupoj personon, kiu estas vere kapabla instrui Esperanton kaj komencu kurson. Mi sperte scias, ke precipe en la lernejoj, kie oni ne instruas fremdajn lingvojn, la kursoj estas bonege vizitataj. Mi denove diras, ke la elekto de la instruanta persono estas tre grava. Ĉar estas antaŭ ĉio necese, ke la infanoj estu entuziasmigataj por la mondlingvo, kaj ke ili baldaŭ povu uzi kelkajn esperantajn frazojn en la praktika vivo. La ĝojo pri tia malgranda sukceso instigas ilin al nova fervoro. Obstineco estas ĉe tio la lasta postulo.

Nun estu dirataj ankoraŭ kelkaj vortoj al niaj gesamideanoj inter la instruistoj. Inter la esperantistoj precipe vi havas okazon, utili al nia afero. Ne lueĝu, karaj kolegoj, ĝis la nombro de la esperantaj klasoj estu egala al la nombro de la esperantaj instruistoj.

Ne hezitu plu! Ne timu la mokon de viaj neesperantaj kolegoj! Baldaŭ estos la tempo, kiam oni forgesis la mokon. Vin oni ĝenerale ne rifuzos, se vi petos pri uzado de la lerneja ĉambro por laŭvola, privata Esperanto-kurso. Tre facile estos eble al vi, varbi partoprenantojn inter la infanoj. Kiam ĉiu esperantista instruisto havos sian esperantan klason, tiam la progreso de Esperanto dekobliĝos. Komence la dankemo kaj la fervoro de viaj gelnantoj estos via sola rekompenco. La alia sekvas baldaŭ!

W. Hahn,

instruisto, Schönau-Chemnitz.

Ur »Das Esperanto ein Kulturfaktor».



Libroj kaj gazetoj.

Nova gazeto: »*Socialismo Esperantista*», ĉiumonata socialista gazeto. Redakcio kaj administracio: Sekretariejo ĉ, Domo de l' Popolo, Strato Piamonte, 2, Madrid, Hispanujo.

Nova libro: *Tra la Javo*, esperanta lernolibro de Lucy E. Waddy. — Tre rimarkinda novaperajo en la fako de esperantaj lernolibroj. Ni revenos al ĝi en venonta numero.

La nomo en la arĉselo.

La granda balosalono kuŝis en brilanta lumo. La muziko sonis kaj oni dancis kun granda ĝojo. Brilantaj okuloj kaj ridetantaj lipoj kie ajn oni rigardis, sed plej bela el ĉiuj tamen estis la juna baronino, kiu staris tie kun briletanta rigardo kaj ardantaj vangoj. Ŝi dancis laŭ la ritma takto de la muziko.

Nun la muziko ĉesas por momento, kaj nevideble ŝi kaŝiras eksteren en la malvarmo kaj blovo de la vintro-nokto. Ŝi iras al la granda parko, kie ĉiuj arboj estas nudaj kaj senfoliaj.

Kien ŝi iros sola en la nokto kaj la malvarmo? La parko kuŝas pura kaj blanka sub la brilanta kovrilo de neĝo. Sed pli kaj pli longe en la parkon ŝi direktas siajn paŝojn. Nun ŝi atingis la celon por sia irado, maljunan betulon.

Malrapide ŝi iras antaŭen, metas sian brakon ĉirkaŭ la trunkon de la betulo, kaj en la malhela brilo de la neĝo, ŝi povas observi nomon. Ŝi metas sian flamantan vangan kontraŭ la frostan arboŝelon, kaj sonĝas pri ĉio, kio pasis. Kaj ŝiaj pensoj faras pilgrimiradon al la pasinteco.

Ŝi memoras sian unuan varman amon, sia unua renkonto kun li, en tiu ĉi loko. Kiel bone ŝi memoris la vesperon, kiam li tranĉis tiun nomon kaj al ŝi malkaŝis sian profundan varman amon, kaj kiel bone ŝi nun en la imago vidis liajn malhelajn belajn okulojn, kiuj, simile la du brilantaj steloj kondukis kaj lumigis ŝiajn mallumajn zorgoplenajn tagojn. Kaj ŝajnas al ŝi, ke ŝiaj oreloj ankoraŭ estas karesataj de lia profunda, serioza voĉo.

Sed ili neniam posedus unu la alian, ĉar la vivo kaj la sorto disigis ilin, kaj poste ŝi ne pli frue ol nun, revidis la lokon, kie ŝi renkontis lin.

Kaj poste venis la riĉa, eminenta barono, kaj ŝi estiĝis lia fianĉino. La homoj admiris ŝin kaj enviis ŝian feliĉon, riĉecon kaj belecon. Sed ŝi nur ridetis ilin — kion ili sciis pri ŝia feliĉo?

Malfortiginte la muziksonoj atingis ŝin, kaj nun ŝi komencis pripensi, ke oni eble sentas ŝian foreston en la balosalono.

Dum momento ŝiaj flamantaj vangoj ripozas premitaj al la frosta nomo sur la betulo, kiun ŝi nun

eble lastafoje vidas, ĉar morgaŭ ŝi ree veturos for el sia hejmo.

Nun ŝi iras de la parko kaj baldaŭ, kun ardantaj vangoj kaj brilantaj okuloj ŝi dancas ree kiel neniu malĝojo tuŝis ŝian koron.

Sed en la parko, la maljuna arbo staras forlasita. La vintra noktovento ĉirkaŭŝiras minacante ĝiajn frostigitajn branĉojn. Momente la luno rigardas tra la malhelaj nuboj kaj lumigas preskaŭ superkreskitan nomon, kiu tie estas enranĉita.

El la sveda tradukis

Einar Adamson.



Rebonu je La Espero!

Alvoko.

Kiel ni jam per la gazetoj scias, la belgoj suferas terurege de la milito, eĉ pli ol aliaj, ĉar ili eĉ ne havas teron, sur kiu ili rajtas esti. Al Holando multaj iris, kaj tiujn la holandanoj prizorgas. Sed la holandanoj mem suferis multe jam antaŭ la invazio de la belgoj, nun ili tamen laŭpove helpis al ili kvankam ne multe sufiĉas.

Pensante, ke la svedaj esperantistoj iom provos kunhelpi la holandanojn en ilia bonkora entrepreno, la holanda esperanto-societo »La Estonto Estas Nia« direktas al ni alvokon, en kiu ili petas, ke ni monokolektu por iom helpi al ili.

Kaŭze de tio kaj konsiderante samtempe, ke tio estas unu el la flankoj de la agadejo de »nia kara«, la Stockholma Laborista Esperanto-Grupo decidis aranĝi tian monokolekton. Pro tio mi en la nomo de la jus nomita esperanto-grupo petegas al la svedaj samideanoj provi laŭpove helpi al granda rezultato de tiu monokolekto.

La mono estu sendata al la kasisto de la grupo, s-ro O. M. Carlsson, Vikingagatan 144½, Stockholm Va.

Kun antaŭdanko!

Laŭ admono John Johansson, sekr.

”Esperantostjärnan”

Jul- och Nyårspublikation
utgiven av

La Esperanta Stelo
NORRKÖPING.

Originellt omslag. 16 sidors text med
talrika illustrationer. Omväxlande och
intressanta bidrag. Esperantoavdelning.

Pris endast 25 öre.

Vid större order rabatt.

Léander Tell, Norrköping.

Skandinavoj kiuj havas kona-
tojn en Ameriko, estas petataj
admoni ilin skribi al Skandinava
Esperanto-Instituto, Rockford, Ill.
U. S. A. por ricevi informojn.

Subskribintoj havas la honoron
sciigi niajn estimatajn samideanojn,
ke nia edziĝo okazos sabaton la 26-an
de decembro (la duan tagon de krist-
nasko) 1914, je la 6-a horo vespere
ĉe Centralhotellet en Gävle.

Georg W. Wahlund

kaj


Sandra Sjögren

Atentu! La monsumoj estos poste
reviziataj en »La Espero« kaj ni
sendos ĝin tuj post la fino de kolek-
tado al la suprenomita holanda
societo.

* * *

En rilato kun tio estas citinde,
ke la alvoko de la holandaj espe-
rantistoj jam portis fruktojn en
aliaj lokoj. Tiel ekzemple kolektigis,
dank' al la iniciato de s-ro Carl
Winberg, Bengtsfors, bona sumo en
tiu loko por la nobla celo.

Red.



Rebonu je La Espero!

HERRAR

ekipera sig bäst och fullständigast hos

Axel Lidholm

Drottninggatan 30 - - GEFLE

Kiam vi bezonas
viandon, mendu
ĉe

FRANS A. OLSON

Telef. 34 □ GEFLE □ Telef. 34

Presenter inköpta hos

Juvelerarefirman

A. U. Wahlberg, Gefle

— äro alltid välkomna.

Filial i Bollnäs.

Josef Wikströms

Tobakshandel

GEVALIAPALATSET - GEFLE

Central- och Jernvägshotellen

GEFLE

REKOMMENDERAS!

SKODON

Största sortiment hos

A. M. Zimmerman & Co



C. J. LINDH

BOK- & DISTRIBUTIONSAFFÄR

S. FÄLTSKÄRSGATAN 19, GEFLE

Rekommenderar sig vid behov av
Böcker, Tidskrifter och Häftesarbeten.

RIKSTELEFON 1697.

Lämpliga Julklappar och Nyårsåvåror:

“Esperanto“-Papeterikartong

i esperantofärgerna och med esperantostjärna å locket, innehållande 25 ark Linnepost och 25 fodrade kuvert i elegant utstyrel;

Damformat Kr. 1: 50 franco.

Herrformat » 1: 65 »

“Esperanto“-papeteri (påsar)

10 ark papper, 10 fodrade kuvert.

Damformat 1 st. 35 öre, 3 st. 0:90 Kr. franco.

Herrformat 1 » 35 » 3 » 1:— » »

W. WAHLUND, GÄVLE.

La Espero

utgives av Gefle Esperanto-förening och utkommer omkr. den 15 i varje månad.

Lösnummerpris 10 öre.

Prenumerationspris Kr. 1: 20.

Prenumeration kan ske dels direkt hos tidningens expedition, **Gefle**, dels genom återförsäljare eller på posten.

Återförsäljare önskas på varje plats! Provision om flere exemplar tagas!

Prenumerantsamlare erhålla 20 öre för varje anskaffad prenumerant, om minst 5 prenumerationsavgifter insändas samtidigt.

Abonprezo ekster Svedujo 1:00 Spesmilo. (12 numeroj).

Specimeno kontraŭ respondkupono. Mendo ĉe R. Pehrsson, 3—23, Gefle.

Wickmans Kappaffär

NORRA KUNGSGATAN 7 - GEFLE

Vid Rådhusplanaden.

Kappor o. Promenaddräkter i stort urval. Beställningar emottagas o. utföras förstklassigt.

RIKSTELEFON 1391.

Gust. Holms Förstoringsanstalt

Brunnsgatan 78, Gävle. □ Tel. 1628.

Faras pligrändigojn laŭ fotografajoj.
Unuaklasa laboro. Petu prezaron!

N. Lundgren

GEFLE - Interurba tel. 151

Kamentuboj por fabrikoj.

Pli ol 750 konstruitaj.

Riparoj dum uzado.

Fulmkonduktiloj estas muntataj.

Propra brikejo en Upsala.

Plej granda firmo por konstruo de fabrikoj kamentubojen Skandinavio.

Argenta medalo en Stockholm 1897
» » » Gefle 1901
» » » Norrköping 1906



Från
La Esperos expedition, Gävle,
kan rekvideras:

Läroböcker:

Lärobok i Esperanto av G. H. Backman 1:—
Lärobok i Esperanto av P. Nylén 1:—
Lärobok i Esperanto av Carl Ohlsson 0: 50
(Alla med Esp.-svensk ordlista).
Esperanto-språklära av O. W. Hjærtstätt 0: 40
Esp.-svensk och svensk-esp. ordbok av O. W. Hjærtstätt 0: 60
Svensk-esp. ordbok av E. Lison Finn 1: 50

Sveda Kantaro, kun melodioj 0: 35
Esperantista Kantaro, » 0: 75

Nova Testamento (afrankite)... 2: 50

Esperanto-stjärnor 0: 75
Esperantoflagga (bordsflagga)... 2: 40
d:o (något enklare) 1: 75
d:o (mindre) 0: 85
d:o d:o 0: 50
d:o (miniatyr) 0: 15


10:e världs-Esperantokongressens officiella vykort. 1 duss.
1:— kr. 1 st. 0: 10
d:o reklamärken, 100 st.
1:— kr. 1 st. 0: 02

Ozarowsky & Pehrssons

Bleck- & Plåtslageri

N. Kopparslagaregatan 15, Gefle

TELEFON 188



Finna Esperantisto

Officiata monata organo de Esperanto-Asocio de Finnlando. Abonprezo 3:— Fmk.

Adreso: **S-ro Albin Sandström,**
11, Köpmansgatan, Helsingfors.